# UNUA BULTENO

## Kongresaj perantoj

*Sendu viajn aliĝilon kaj pagon ĉiam al la sama adreso. Aliĝojn oni traktos nur post la pago de la kotizo.*

**Aŭstralio:** Libroservo de Aŭstralia E-Asocio, 4/23 Albuera St, Battery Point TAS 7004.

**Aŭstrio:** Leopold Patek, Martinstr. 104/38, 3400 Klosterneuburg.

**Belgio:** Claude Glady, 1 rue du Culot, 5630 Cerfontaine aŭ Flandra E-Ligo, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen.

**Britio:** E-Asocio de Britio, Station Rd, Barlaston, Stoke-on-Trent ST12 9DE.

**Ĉeĥio:** Ĉeĥa E-Asocio, p/a Petro Chrdle, Anglická 878, 252 29 Dobřichovice.

**Ĉinio:** Ĉina E-Ligo, P.O. Kesto 825, 100037 Beijing aŭ Trezoro Huang Yinbao, Esperanto Mailbox 168#, 44300 Jingchuan-Xian, Pingliang, Gans.

**Danio:** Arne Casper-Mortensen, Bryggervangen 70, 4.tv., 2100 København.

**Estonio:** Ahto Siimson, Ept 12-11 Paikuse, 86602 Pärnu Maakond.

**Finnlando:** E-Asocio de Finnlando, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki.

**Francio:** Espéranto-France, 4 bis rue de la Cerisaie, 75004 Paris.

**Germanio:** Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Str. 9, 55129 Mainz.

**Grekio:** Helena E-Asocio, Aristidu 9, 105 59 Athina.

**Hispanio:** Pedro A. Garrote Escribano, C/Las Mercedes, 5-5º-C, 47006 Valladolid aŭ Kataluna E-Asocio, Apartat 1008, 08200 Sabadell.

**Hungario:** Hungaria E-Asocio, Bródy Sándor u. 38, fszt. 3, 1088 Budapest.

**Israelo:** Jehoŝua Tilleman, 97-a Dereĥ-Akko, 26373 Kirjat-Mockin.

**Italio:** Itala E-Federacio, Via Villoresi 38, 20143 Milano.

**Japanio:** Japana E-Instituto, Waseda-mati 12-3, Sinzyuku-ku, 162-0042 Tôkyô.

**Kanado:** Olga Du Temple, 765 Braemar Avenue, North Saarnich, BC V8L 5G5.

**Korea Resp.:** Korea E-Asocio, 1601 (Gangbyeon Hansin Core), 18 Mapo-daero 4da-gil, Mapo-gu, Seoul, 121-703.

**Kroatio:** Boris Di Costanzo, šet. Carmen Sylve 19, 51410 Opatija.

**Latvio:** Margarita Želve, Rūpniecības iela 35-13, Rīga 1045.

**Litovio:** Litova E-Asocio, ab.k. 167, 44002 Kaunas C.

**Nederlando:** UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam.

**Norvegio:** Agnar Fitjar, Wiers Jenssens vei 33A, 5089 Bergen.

**Pollando:** Jan Skonieczka, ul. Chłodna 23ª, 85-345 Bydgoszcz.

**Rusio:** Miĥail Ĉertilov, Titova 6-24, 606211 Liskovo aŭ Halina Gorecka, ab.ja. 1205, 236039 Kaliningrad.

**Slovakio:** Lúbomír Fajth, Plevník 105, 018 26 Plevník.

**Svedio:** Leif Holmund, Kågevägen 40 B, LGH 1303, 931 38 Skellefteå.

**Svislando:** Poŝtĉekkonto 12-2310-0 nome de Universala Esperanto-Asocio.

**Usono:** Esperanto-USA, 1500 Park Av #134, Emeryville CA 94608.

*Reta aliĝilo:*
*www.uea.org/kongresoj/uk_alighilo.php*

Pli sciu
pri la 100ª
Universala Kongreso:

**www.uea.org/kongresoj**

**www.lille2015.fr**

Vizitu kaj ŝatu nin
en Facebook!
"lille2015"

**Nord France Convention bureau**
www.nord-france-convention.com



1
1905
2015

espéranto France

# 100ª Universala Kongreso de Esperanto

## Lillo (Lille), Francio
## 25 julio – 1 aŭgusto 2015

*De la unua... ek al la centa!*





## Bonvenon en Francion!

Escepta estos la okazo festi la centan Universalan Kongreson de Esperanto ĝuste en la regiono, kie okazis la unua! En Lillo, bela ĉefurbo de norda Francio, vi malkovros tute tipan arkitekturon, ŝatos bonvenigan etoson, kaj povos facile iri ĝis la proksima urbo Boulonjo-ĉe-Maro laŭ la paŝoj de L.L. Zamenhof.

La Lilla kongresejo oportune troviĝas proksime al la stacidomoj kaj rande de la urbocentro. Tie vi ĝuos buntan, alt-kvalitan programon preparitan speciale por tiu elstara evento.



Francio estas monde famkonata pro diversaj pejzaĝoj, longa historio, kulturo kaj kuirarto. Dum viaj ekskursoj antaŭ, dum aŭ post la kongreso vi spertos la kulturan riĉecon de la lando.

Lillo situas kerne de triangulo Londono – Bruselo – Parizo (je 80 minutoj for de Londono, 36 minutoj for de Bruselo, 60 minutoj for de Parizo kaj 50 minutoj for de la pariza flughaveno Roissy-CDG).

Norda Francio estas la plej juneca regiono en la lando kaj unu el la plej loĝataj en Eŭropo. Pordo de Francio al norda Eŭropo, la regiono mirigas kaj mirindas.



## Riĉa heredaĵo

Rigardante al la estonteco, Lillo tamen fiere konservas siajn historion, tradiciojn kaj identecon. La urbon konkeris laŭvice la flandroj, la britoj, la nederlandanoj, la hispanoj kaj la francoj. Tiuj epokoj plu videblas en miriga arkitekturo kun diversaj influoj.

Tiel en Lillo kunestas malnovo kaj novo. La riĉeco de la diversepokaj stiloj donas evidentan ĉarmon al la urbo.





*"En Bulonjo-sur-Maro kunvenis ne francoj kun angloj, ne rusoj kun poloj, sed homoj kun homoj"* – L.L. Zamenhof

Ĝuu en Lillo kaj Bulonjo-ĉe-Maro la internacian amikecan etoson de tiu historia regiono Esperantuja! Tie vi trovos spurojn de la unua kongreso.



Lillo estas urbo plej agrabla. Laŭ ĝiaj stratoj vi trovos luksajn butikojn kaj butikoplenajn piedstratojn, artogaleriojn kaj multkolorajn stratbazarojn…

Karbonado, "potjevleesch" (potetviando), fromaĝoj kaj tradiciaj bieroj: tiujn trezorojn vi frandu en centjaraj tavernoj aŭ plej modernaj restoracioj, kie la franca kuirarto kunigas lokajn tradiciojn kaj internaciajn receptojn.

## Svarma kulturo

Kulturo grave rolas en Lillo, kiu enkalkulas 20 muzeojn. Goya, Delacroix kaj Rodin briligas la Belartan Muzeon (dua plej ampleksa muzeo en Francio, post Louvre).



En la najbara urbo Roubaix naĝejo iĝis unu el la plej belaj muzeoj en Francio. La nova muzeo Louvre-Lens malfermiĝis en 2012 sine de mineja areo kaj jam ravis centmilojn da vizitantoj.

Dumjare okazas multaj festivaloj, paradoj, spektakloj, gravaj ekspozicioj… Rimarkinda estas la granda stratbazaro de Lillo, kiu estas la dua plej ampleksa strat-evento en Eŭropo.

Sincero, gastigemo, festemo kaj bon-etoso plene apartenas al la nordfrancia, Lilla vivo.

***Lillo estas urbo, kie vi ŝatos kongresi!***

